

## **4a DIMANĈO DE KARESMO – 6-a de marto 2016**

### **VIA FRATO ESTIS POR MI MORTINTA, KAJ NUN REVENIS AL LA VIVO Komento al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM**

#### **El la evangelio laŭ Luko 15, 1-3.11-32**

**En tiu tempo impostistoj kaj malbonfamaj homoj alproksimiĝis al Jesuo por aŭskulti Lin. Sed fariseoj kaj leĝinstruistoj murmuris, dirante: «Tiu ulo favore akceptas malbonulojn kaj manĝas kun ili». Tiam Li diris al ili la jenan parabolon:**

**«Iu viro havis du filojn. La pli juna diris al la patro: "Patro, donu tuj al mi la heredotan parton". Tiam la patro dividis inter ili siajn havaĵojn. Post ne multaj tagoj la pli juna filo vendis ĉion, kaj kun la akirita mono forvojaĝis al malproksima lando. Tie li perdis sian tutan havon per diboĉa vivado. Sed en tiu lando, kiam li jam elspezis ĉion, okazis granda malsato; kaj baldaŭ la junulo troviĝis meze de gravaj malfacilaĵoj. Tiam li iris al unu el la loĝantoj de tiu lando kaj proponis al li sian servadon. Tiu sendis lin sur siajn kampojn gardi porkojn. La junulo estis tiel malsata, ke li volus plenigi sian ventron per la karoboj, kiujn la porkoj manĝis, sed neniu donis ilin al li. Tiam li pripensis sian situacion, kaj diris: "La taglaboristoj de mia patro havas nutraĵojn abunde, dum mi ĉi tie pereas pro malsato! Mi reiros al mia patro, kaj mi diros al li: Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj kontraŭ vi; mi ne plu meritas esti via filo; traktu min kiel unu el viaj taglaboristoj!". Li tuj leviĝis kaj reiris al sia patro.**

**Li estis ankoraŭ malproksime de la patra domo, kiam lia patro lin vidis, kaj kortuŝite kuris renkonte al li. Li brakumis lian kolon kaj lin kisadis. Tiam la filo diris: "Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj kontraŭ vi. Mi ne plu meritas esti rigardata kiel via filo". Sed la patro ordonis tuj al siaj servistoj: "Rapidu: alportu la plej belan robon kaj lin vestu. Metu ringon sur lian fingron kaj sandalojn sur liajn piedojn. Poste prenu la bovidon, kiun ni grasigis, kaj buĉu ĝin. Ni devas havi festenon pro lia reveno: ĉar ĉi tiu mia filo estis por mi mortinta, kaj nun li denove revenis al vivo; li estis perdita, kaj mi denove retrovis lin". Kaj ili komencis festi.**

**La pli aĝa filo estis sur la kampo; je sia reveno, kiam li alproksimiĝis al la domo, li aŭdis muzikon kaj dancadon. Tiam li**

**alvokis unu el la servistoj, kaj demandis lin, kio okazas. La servisto diris: "Via frato revenis, kaj via patro buĉis la bovidon, kiun ni grasigis, ĉar li rericevis sian filon viva kaj sana". Sed la pli aĝa frato montriĝis ofendita kaj eĉ ne volis eniri. Tiam lia patro elvenis, kaj klopodis konvinki lin eniri. Sed la pli aĝa filo diris al li: "De tiom da jaroj mi servas al vi kaj neniam mi malobeis vian ordonon. Tamen vi neniam donis al mi kapridon, por ke mi festenu kun miaj amikoj. Sed nun revenis ĉi tiu via filo, kiu fordiboĉis vian havon kun malĉastulinoj, kaj por li vi buĉis la grasigitan bovidon!". La patro respondis: "Filo, vi estas ĉiam kun mi, kaj ĉio mia estas ankaŭ via. Mi ne povis esti feliĉa kaj festi, ĉar ĉi tiu via frato estis por mi mortinta kaj nun revenis al la vivo; li estis perdita, kaj nun mi retrovis lin!"».**

Tio, kion fariseoj kaj leĝinstruistoj, reprezentantoj de la eklezia institucio, ne komprenas, estas, ke Dio ne zorgas pri tio, ke oni Lin obeas kaj respektas, sed zorgas pri la feliĉo de la homoj. Tial leĝinstruistoj kaj fariseoj, se ili ne ŝanĝiĝos, neniam povos koni la ĝojon de la Patro.

Tion esprimas Luko en tiu ĉi ĉapitro per unu el la paraboloj plej multe konataj kaj amataj, tiu pri la diboĉa filo. Ni legu.

Skribas Luko: *"impostistoj kaj malbonfamaj homoj alproksimiĝis al Jesuo ..."*. Ĉiuj, senescepte. Ĉiuj, vivantaj peke sentis en Jesuo tonon malsaman. Ne plu minacojn, ne plu punojn, sed amon ankaŭ al ili. Ne nur amon, ankaŭ respekton.

*"...por aŭskulti Lin"*. Kaj jen la kutima reago de la religiaj aŭtoritatuloj: *"Sed fariseoj kaj leĝinstruistoj murmuris, dirante: "Tiu ulo ..."*. Rimarku: en la evangelioj la religiaj ĉefuloj, la religiaj aŭtoritatuloj, la spirita elito, neniam prononcas la nomon de Jesuo, sed pri Li parolas kun malŝato kaj malrespekte.

*"...favore akceptas malbonulojn kaj manĝas kun ili'..."*. Ne nur ilin akceptas, kun ili li manĝas; manĝi kune signifas kune vivi. *Tiam Li diris al*

*ili...* (ne al la disĉiploj, kiel kutime, sed ĝuste al ili, la religiaj aŭtoritatuloj: fariseoj kaj leĝinstruistoj "*... la jenan parabolon:*")

La parabolo estas tiu, de ĉiuj konata, pri la diboĉa filo. Ni ĝin nur resumos, ĉar ĝi estas longa kaj ne estas sufiĉe da tempo por komenti ĉion: "*...Iu viro havis du filojn*", la pli juna petas de li sian parton de la heredaĵo. Por kompreni la tuton, atentu tion: "*la patro dividis inter ili siajn havaĵojn*"

Tio signifas, ke, laŭ la juda leĝo, la du partoj ne estis egalaj: la pli aĝa filo ricevis la duoblon. La pli juna "*forvojaĝis al malproksima lando...* (probable pagana, kaj "*...tie li perdis sian tutan havon per diboĉa vivo*").

Nun por li la tempo iĝas malfacila: en la lando oni malsatas. Li planis sin vivteni per sia mono, sed sen mono li valoras nenion. Antaŭe li estis dommastro, nun li povas nur iĝi servisto.

Luko precizigas: "*Tiam li iris al unu el la loĝantoj de tiu lando kaj proponis al li sian servadon...*". Kian servadon li trovis! "*...Tiu sendis lin sur siajn kampojn gardi porkojn*. La porko estas besto leĝe malpura, tia laboro estas la plej malŝatinda. Kaj li eĉ ne ricevas nutraĵojn, do li malsatas, kaj al si mem "*... li diris: ,La taglaboristoj de mia patro havas nutraĵojn abunde, ... (do la patro estis malavara ne nur al la filoj, sed ankaŭ al la laboristoj), ,... dum mi ĉi tie pereas pro malsato! Mi reiros al mia patro, kaj mi diros al li:...*

Ni ne miskomprenu la parabolon! Iuj prezentas tiun filon kiel modelon de konvertiĝo, de pentito. Tute ne! Li zorgas nur pri sia avantaĝo, precipe koncerne monon. Ne mankas al li la patro, sed la pano. Ne de konscienciproĉo li estas pelita al sia patro, sed de malsato. Neniu aludo al la doloro, kiun li kaŭzis al sia familio.

"*...Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo...*" (do kontraŭ Dio) "*... kaj kontraŭ vi; mi ne plu meritas esti via filo;*". Li ne plu havas rajtojn, ĉar sian heredaĵon li ricevis "*... traktu min kiel unu el viaj taglaboristoj!*".

Do li ne scias, kiu estas la rilato inter filo kaj patro. "*... Li tuj leviĝis kaj reiris al sia patro*". Mi ripetas, kion mi diris antaŭe, li ne revenis pro pentito, sed por avantaĝo: Ne mankas al li la patro, sed la pano.

*Li estis ankoraŭ malproksime de la patra domo, kiam lia patro lin vidis, ... kaj kortuŝite...*". La kortuŝo estas en la dia ago redonanta la vivon al kiu estas sen ĝi (ĉi tiu estas la triafoja uzo de tiu esprimo en la evangelio de

Luko: la unua estas en la epizodo de la vidvino de Nain (Lk 7,13), kiam Jesuo kortuŝite redonis al ŝi la mortintan filon, la dua en la parabolo pri la bona samariano (Lk 10,33), kiu, vidinte vunditon, kortuŝite bandaĝis liajn vundojn kaj lin kuracis; do la ago de la patro ne venas de ofendiĝo aŭ kolero, sed inspirita de deziro, redoni la vivon) "...*kuris renkonte al li* (laŭ la tiutempa tiuregiona kulturo, kurado montris humiliĝon: persono pli aĝa ne kuris al junulo, des malpli patro al filo; sed ĉi tiu patro intencis honori sian filon eĉ malhonorante sin mem)."... *Li brakumis lian kolon ...* (se ni estus inter la tiutempaj aŭskultantoj, ni probable opinius, ke la logika sekvo de tiu kolbrakumo estus koltordo al tiu stulta filo, kiu, fordiboĉinte ĉion, konkludis siajn aventurojn kiel porkogardisto) "... *kaj lin kisadis*".

Tiu estas la surprizo! Kaj Luko memorigas la unuan gravan pardonon en la Biblio, kiam Esav pardonis sian fraton Jakobo, kiu estis depreninta de li la heredrajton (Gen 33,4): eĉ la sinsekvo de la agoj estas la sama: la kuro al renkonto, la kolbrakumo, la kiso, kiu la pardonon sigelas. Laŭ Luko, la patro, simbolanta Dion, pardonas la filon jam antaŭ la pardonpeto. La filo ne fidas, kaj komencas la preparitan paroladeton: "*Tiam la filo diris: ,Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj kontraŭ vi ...*". La patro ne atendas, ke li finu.

"*Sed la patro ordonis tuj al siaj servistoj: ,Rapidu: alportu la plej belan robon kaj lin vestu!*". La robo estis honorigo, kiu donis dignon al la persono. Tiu junulo, tiu filo perdinta sian dignon, nun ĝin plene reakiras. Sed surprizas nin pli multe la sekvo.

"*Metu ringon sur lian fingron ...*". La ringo ne estis simpla juveleto. Ĝi estis la sigelilo, kiun tenis la domadministranto. Do la patro al tiu sentaŭga filo fordiboĉinta sian havaĵon redonas la dignon kaj konfidon pli larĝan ol li ĝuis antaŭe. Li konfidas al li la administradon de la domo, ne konante, kiel tiu ofico estas plenumota. "...*kaj sandalojn sur liajn piedojn*". Memoru: la junulo petis traktadon egalan al la taglaboristoj: sed tiuj marŝis nudpiede, nur la mastroj uzadis sandalojn.

"*'Poste prenu la bovidon, kiun ni grasigis, kaj buĉu ĝin. Ni devas havi festenon pro lia reveno: ĉar ĉi tiu mia filo estis por mi mortinta, kaj nun li denove revenis al vivo; li estis perdita, kaj mi denove retrovis lin.'* Kaj ili komencis festi". Kaj jen alvenas sur la scenejon tiu, por kiu la parabolo estas rakontita.

"*La pli aĝa filo...* (li simbolas la leĝinstruistojn kaj la fariseojn) *estis sur la kampo; je sia reveno, kiam li alproksimiĝis al la domo, li aŭdis muzikon kaj dancadon. Tiam li alvokis unu el la servistoj, kaj demandis lin, kio*

*okazas. La servisto diris: ‚Via frato revenis, kaj via patro buĉis la bovidon, kiun ni grasigis, ĉar li rericevis sian filon viva kaj sana.‘ Sed la pli aĝa frato montriĝis ofendita kaj eĉ ne volis eniri. Tiam lia patro elvenis, kaj klopodis konvinki lin eniri. Sed la pli aĝa filo diris al li: ‚De tiom da jaroj mi servas al vi kaj neniam mi malobeis vian ordonon. Tamen vi neniam donis al mi kapridon, por ke mi festenu kun miaj amikoj. Sed nun revenis ĉi tiu via filo, kiu fordiboĉis vian havon kun malĉastulinoj, kaj por li vi buĉis la grasigitan bovidon!’*^

Nun ni memoru, ke la pli aĝa filo ricevis la duoblon kompare kun la pli juna, kaj ke ĉio, kio restis al la patro, estis plenrajte lia. Kial li ne prenis mem, kion li deziris? Pro la religio. La religio rilatas al la personoj, kvazaŭ ili estus infanoj; la rilato kun Dio ne estas amo, sed obeo, servado, postulanta rekompenco. Precipe, ili bezonas rajtigon por sia ĝojo aŭ malĝojo.

La patro antaŭe iris renkonte al la foririnta filo, kaj nun egale iras renkonte al tiu alia filo kiu ne volas rehejmiĝi, kiu en sia plendo nomis la fraton "via filo", kaj la patro memorigas, ke ili estas fratoj.

*„La patro respondis: ‚Filo, vi estas ĉiam kun mi, kaj ĉio mia estas ankaŭ via La pli aĝa filo vivis kiel servisto, ne ĝuis sian situacion de filo). Mi ne povis esti feliĉa kaj festi, ĉar ĉi tiu via frato ... (jen la memorigo pri la familia rilato) estis por mi mortinta kaj nun revenis al la vivo; li estis perdita, kaj nun mi retrovis lin!’* “. Do Jesuo diras al la leĝinstruistoj kaj fariseoj, ke ili ĝoju ĉar al Li venas tiuj pekuloj, tiuj nekredantoj. Ni tamen scias de la evangelio, ke bedaŭrinde la leĝinstruistoj kaj fariseoj, blindigitaj de sia koncepto pri justeco, de sia fideleco al la leĝo, neniam komprenos la mizerikordon de Dio.